**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Grava Informo de
Radio Vaticana
legu detalojn
sur paĝo 2!
=============

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 48/76 13 dec 1976
Aperas ĉiusemajne

## Okaze de la 15-a de decembro

Kiam...naskiĝis Zamenhof, malfermiĝis lia libro. Sur ĝi, kvazaŭ per ies nevidata mano, skribite estis: "LIBRO DE GLORO - EN DOLORO". Kaj efektive. Sur grizaj paĝoj de la libro enskribiĝadis lia vivo en doloro - por gloro. Zamenhof venis en la mondon kun interna fajro, kiu puŝadis lin, peladis, kiel sklavon, sur piedestalon de gloro tra dornoj de la griza vivo.

Ĉiu homo ĉe sia naskiĝo ricevas kvazaŭ dote sian destinon. Sed ne ĉiu poste fariĝas tiu laŭ la destino. Kaj jen skulptisto ofte pli bone "botistas" ol skulptas, "dentisto" pli bone "tajloras", juristo ,...hm...."kuracistas", lingvisto - "okulistas", kaj tiel plu.

Kaj en tio ĉi kuŝis la doloro de la vivo de Zamenhof, ke genia, inspirita lingvisto devis - "okulisti". La fajro, la destino pelis lin al idealo, sed la prozo de la vivo vokis - al realo. Kaj kiam lia lampeto en ĉielo ekanoncis la estingiĝon de lia vivo, kiam la okuloj de Zamenhof fermiĝis kaj la koro haltis - en lia libro estis unu sola minuso. Tiu ĉi minuso estis - ke, mem nobla, li blinde kredis kaj fidis je nobleco de homoj, al kiuj li oferis la tutan realon de sia vivo, tutan ĝian ĝojon. Kaj kiam fermiĝis super li la freŝa tombo, homoj eksentis grandan domaĝon, pezan riproĉon, ke ili ne sciis gajigi la vivon de sia Majstro. Vekiĝis la konscio, sed tro malfrue.....

...Ekkdredis mi, ke ĝuste en la festotago de 15. 12., kiam naskiĝis homo, kiun ĉiuj esperantistoj de la mondo nomas sia "Majstro"; ke en ĉi tiu tago de la naskiĝo, naskiĝos ankaŭ la unuiĝo kaj konkordiĝo de l' tutmonda esperantistaro; ke kun ties naskiĝo en la "tago de libro" malfermiĝos nova epoko, ora libro de gloro - sen doloro, libro, en kiu enskribiĝados nur plusoj de la Esperanto-movado. La paĝo de minusoj restos - blanka. Mi ekkredis, kaj mi kredas, ke tio ĉi venos, ĉar ĝi devas veni. Se eĉ ne tuj post miaj ĉi vortoj, tamen eble iam...

Pli bone estas iam, ol neniam.

Felix Zamenhof

La suprajn vortojn skribis Felix Zamenhof, la frato de Ludwig L. Zamenhof, okaze de la 15-a de decembro 1929. Ili estas aktualaj ankaŭ en la jaro 1976.

******************

## Zamenhof-festo en Stuttgart

Stuttgart (pp) - La Zamenhof-festo de la Esperanto-grupo Stuttgart okazos sabaton, la 18-an de decembro, je la 19-a horo, en hotelo "Wartburg-Hospiz", Stuttgart, Lange Strasse 49. Festprelegos pastoro Adolf Burkhardt, Bissingen, pri "Libero kaj Amo" kaj "Kalevala", du verkoj el la finna-ugra lingvo-grupo en Esperanto aŭ ...ĉu necesas timi la poezion?

*******************

Pilo-Press, internacia informservo, jara abono 30,- DM Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579

## 10-minuta Esperanto-Programo de Radio Vatikana

Citta del Vaticano (pp) - Grava informo atingis nin de Radio Vatikana. Ekde la 2-a de januaro 1977 la Vatikana Radio dissendos ĉiudimanĉe, de la 21.05 ĝis 21,15 horo (Mezeŭropa Tempo) programon en Esperanto sur jenaj ondoj:

Mezlonga ondo 1529 khc ĉiudirekten

Kurtondoj: 6190 khc, 7250 khc, 1529 khc (en la direkto de Eŭropo)
9625 khc, 11705 khc, 15120 khc (en la direkto de Afriko).

En la programo estas entenataj: Religia penso, Informoj el la katolika mondo, Konversacio pri aktualaĵoj aŭ intervjuo, koresponda rubriko.

Petu la senpagan "Programon 1977". Skribu al "Esperanta Programo", Redacione Centrale, Radio Vaticana, Cittá del Vaticano.

*********************

## Novaĵoj el Bonn

Bonn (pp) - Depost la 25-a de oktobro en Bonn ekzistas laboropreta ekzamena komisiono de Germana Esperanto-Instituto. La komisiono prizorgas la regionon Bonn-Köln, kaj rajtas ekzameni kandidatojn por la ekzameno pri lingva kapableco. Ĝis nun neniu serioze interesiĝis pri tio. Tamen la komisiono alvokas la esperantistojn el tiu regiono cele de plialtigo de la lingva nivelo submetiĝi al ekzamenoj kaj sin anonci ĉe: Hartmut Trunte, Sebastianstr. 43, D-5300 Bonn 1.

Komence de decembro Esperanto-Grupo Universitata Bonn eldonis la aldonan kajeron por sia lernolibro "Praktiku kun ni Esperanton" ankaŭ en la nederlanda. La tradukon liveris s-ro Drabs el Luksemburgo, kiu ankaŭ tuj mendis 35 ekzemplerojn de la nederlanda eldono.

Dum la vintra semestro EGU Bonn sukcesis logi kelkajn prelegantojn al Bonn por tie vigligi la kursojn por progresantoj. La 22-an de novembro Hans-Dieter Platz lumbildprelegis pri vojaĝo al Israelio. La 17-an de decembro la grupo atendas Wolfgang Loose, kiu prelegos kun lumbildoj pri sia plurmonata per-Esperanta vojaĝo tra Eŭropo inter Pollando kaj Greklando.

## Kulturaj aranĝoj 1977 en Grésillon

Baugé (pp) - En la jaro 1977 okazos en la Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon jenajn aranĝojn:

Paskon, 3.4. - 9.4.77 Renkontoj de infanoj; "Kiel gvidi kurson?", aranĝo por kursgvidantoj pri praktika pedagogio.

Somero: Unua periodo, 4. - 23.7.1977 Diverstemaj prelegoj, diskutoj, distraj aktivaĵoj, ekskursoj, praktikado de la lingvo.


Dua periodo, 25.7. - 13.8.1977 Kurso por komencantoj, praktikado, supera kurso, manaktivaĵoj, ekskursoj

Tria periodo, 15.8. - 3.9.1977 Programo kiel dum la dua periodo

Petu detalajn informojn de Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé.

## 18-a Eŭropa Ferio-Semajno 1977

La 18-a Eŭropa Ferio-Semajno 1977 okazos de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1977 en Wengen, Jungfrau-regiono. Petu detalan programon de Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstr. 17, CH-5200 Brugg, Svisl.



Dimpflmoser telefonas en Esperanto kun la financoficejo!

## Zamenhof-festo kun nova etoso

München. (pp) - Sendube en München regas nova etoso en la Esperanto-vivo. Post kelkjara intensa informa kaj varba laboro, speciale pere de ekspozicioj, montriĝas la unuaj rezultoj. Aliĝis kelkaj junaj homoj, regule okazas Esperanto-kurso sub la gvido de Reinhold Maier, profesia instruisto kaj kreskis la solidareco inter la membroj.

Tiu pozitiva ŝanĝo montriĝis ankaŭ en la ĉi-jara Zamenhofa festo, kiu okazis ne en restoracio, sed en la kutima granda klubkunvenejo, kiu ebligis varian programon.

Oni rezignis pri la kutima, ofte teda, festprelego. Post salutaj vortoj fare de Josef Weidacher, estro de la fervojista Esperanto-grupo kaj la "dommastro", kaj Horst Spirat, estro de la Esperanto-Klubo München, gimnazia instruisto Ludwig Thalmaier lumbildprelegis pri vojaĝo al kaj tra Nepalo. Oni povis rigardi filmon pri Aŭstralio en Esperanto kaj spekti skeĉon, prezentitan en 4 varioj, kiu vere trovis bonan aplaŭdon kaj provokis ridon. Kiel nova talento sin malkaŝis Reinhold Maier en sia monologo kiel"Dimpflmoser" (vidu la supran desegnaĵon!). Estis aktivigitaj tri paroj el la publiko, kiu same prezentis scenojn, el la ĉiutaga vivo, senprepare!

Ke la festo pasis en gaja kaj harmonia atmosfero, tion oni dankŝuldas al la kvar aŭ kvin inaj membroj de la klubo, kiu zorgis pri la "stomaka bonfarto" de la ĉeestantoj kaj preparis kaj ofertis teon, kukon, bieron, vinon, kolbasetojn ktp. kaj aranĝis riĉenhavan tombolon!

## Eŭropa Lingvo-politiko

Paderborn (pp) - La jarĉefkunveno de "Laborrondo pri liberala Eŭropa lingvo-politiko" reelektis prof. d-ron Helmar Frank kiel prezidanton. Vicprezidantoj fariĝis deputito Walter Drees kaj prof. Lothar Weeser-Krell.

Tiu laborrondo antaŭ nelonge starigis kernpostulojn rilate Eŭropan lingvo-politikon. Oni aŭdis, ke nun ankaŭ la du grandaj federacigermanaj partioj CDU kaj SPD volas okupiĝi pri lingvopolitikaj problemoj en la Eŭropa unuiĝprocezo.

## Esperanto en radio

Bedaŭrinde momente la atmosferaj kondiĉoj estas malfavoraj por aŭskulti al kurtondaj elsendoj. Je tio speciale suferas la elsendoj el Vieno, Romo kaj la posttagmezaj elsendoj el Varsovio. Sed laŭ sperto la kondiĉoj plibonigos post kristnasko, kiam la tagoj plilongiĝos denove.

Plej bone aŭdeblaj estas la matenaj elsendoj de Radio Varsovio je 200 m. La Esperanto-Ekspreso disaŭdigis du interesajn intervjuojn pri la Esperanto-gazetaro kaj pri la programadlingvo "Progreso".

Citaĵo el semajna komentario de d-ro Alfred Macher, ORF-Wien: "Waldheim konsideras la solvon de la Proksim-Orienta problemo unu el siaj plej urĝaj taskoj. La ĉefo de la UNO-trupoj en la siria-izraelia limzono estas aŭstriano. Nia kanceliero Bruno Kreisky ripete vizitis la arabajn ŝtatojn kaj Izraelion, provante konstrui interpacigajn pontojn, kvankam la Izraelianoj ofte miskomprenis lian intencon."

Sur la ondoj de Svisa Kurtonda Servo ges-roj Gacond parolis pri siaj programitaj Esperanto-kursoj kaj d-rino Heidi Baur prezentas ĉi-semajne artikolon pri la verkistino Germaine Stael.

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

estas akireblaj de niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?

2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?

3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Stataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "ORBIS"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976-a jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevuo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

| | | |
|---|---|---|
| 6,00 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |
| 16,30 horo | ondolongoj: | 25 m, 31 m, 41 m |
| 22,30 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |